Telefon’

Vortoj: Esirkepov Bahit
Muziko: Ĵomart Amzeev

Mi vekiĝis pro akra son’
Tintas en la nokt’ telefon’
Telefon’ ekstazas.
Kio do okazas?
Kial ĝi tintadas: ”din-din-don”?

Milda voĉo diras: ”Pardon!
Vin kontaktas mi sen rezon’
simple mi enuas.
Do mi rendevuas
kun vi pere de telefon’ ”

Al la nekonata person
Mi respondis kun la admon’
La mateno venas,
jam mi ne komprenas
Kial mi insistas pri admon’

Se al mi okazas malbon’
Tuj mi iras al telefon’
Somas voĉo kara,
Sonas voĉo klara,
Tristi ne plu estas bezon’